

CxEA-retkomunikoj 1/2002

ENHAVO:

1. ELI URBANOVA JUBILEAS
2. EKOTURISMA RENKONTIGxO EN SUMAVA-MONTARO

la cxefa temo de la unua retkomuniko de CxEA en la jaro 2002 estas dedixita al grava jubileo de nia poetino kaj verkistino Eli Urbanova (80). Cxar temas pri la invito por la solenajxo omagxe al sxi (la 7-an de februaro 2002, 16:00 en Prago), ni decidigxis skribi gxin cxehxe, ke komprenu ankaux la komencantoj (kiuj kelkaj trovigxas en la dissendolisto). Se iu de la eksterlandaj ricevantoj intencus veni por tiu okazajxo, mi volonte sendos al sxli pli proksimajn informojn en Esperanto, inkluzive informojn pri la tranokteblo en Prago. Do, jen la cxehxlingva invito:

Milí přátelé,

zdá se to neuvěřitelné, ale je tomu tak: naše slavná esperantská spisovatelka a básnířka a jedna z mála českých esperantistů, kteří byli členy Akademie esperanta, čestná členka Světového esperantského svazu a Českého esperantského svazu oceněná při mnoha příležitostech (uved'me alespoň loni získanou Prémii OSIEK za svůj autobiografický román Hetajro dancas), prostě naše samideánka Eli Urbanová, se dožívá v uspokojivém zdravotním stavu krásného jubilea 80 let.

Při této příležitosti svolila, abychom se s ní sešli na neformálním posezení a popovídání ve čtvrtek 7. února 2002 ve vládním salonku na hlavním nádraží v Praze od 16:00 (přístup z prvního nástupiště, bude označeno). Salonek je k dispozici esperantistům již od 13:00 hodin, můžete si přijít popovídat i dříve, eventuálně i pomoci zaranžovat malé pohoštění. Abychom věděli, pro kolik osob je potřeba připravit salonek a malé občerstvení, prosíme všechny kdo přijdou na setkání s naší básnířkou Eli, aby svoji účast předem nahlásili Mirce Kovaříkové: Miroslava Kovaříková, Žst Praha hl.n., Wilsonova 80, 120 00 Praha 2, telefon 02/2461 5877

Těšíme se na setkání s Vámi a s Eli Urbanovou!

2. EKOTURISMA RENKONTIGxO EN SUMAVA-MONTARO

La ekoturisma renkontigxo EKOTUR, anoncita por aprilo kiel ekoturisma seminario, estas forsxovita (post akcepto de objektiva kritiko rilate la montaran veteron en aprilo) al la dato 11-a gxis 16-a de junio. Gxi okazos en Kvilda, la plej alta cxehxa vilagxo, en la koro de la Nacia parko Sumava. Dum tagoj oni pilgrimos en du grupoj (pli sportema kaj ripozema) ekzemple al la fonto de Vltava, praarbaro Boubin, ktp., vespere oni auxskultos kelkajn prelegojn pri ekologio kaj pri Nacia parko Sumava kaj diskutos je tiuj temoj. Por tiuj, kies lingvaj konoj ne sufixos por cxeesti la vesperajn programojn en Esperanto, okazos paralele vespera lingva rapidkurso

por komencantoj gvidata de Věra Podhradská. Ne hezitu do veni kun siaj neesperantistaj partneroj kaj/aux idoj. Eblas partopreni logxante en komforta tristela hotelo U krále =A9umavy (kie okazos la vesperaj programoj) aux tre favorpreze en tre proksima modesta pensiono.

Por interesatoj estos organizita antauxarangxo en Prago, kiu estos dedicxita ne tradicie al historio, kulturo kaj arkitekturo de Prago, sed al naturo en Prago kaj ties cxirkauxajxo, kiu certe ankaux meritas tion. Fine de la antauxarangxo estas planata komuna vojagxo de Prago al Kvilda.

Precizajn informojn kaj aligxilojn vi ricevos cxe [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)